## PROGRAMO DE LA VENONTAJ SEMAJNOJ

Majo 2008

| | |
|---|---|
| 7 | André Demarque pri Van Gogh per poŝtmarkoj. |
| 14 | Vi mem proponu temon. |
| 21 | Hélène Falk pri aŭskultado de kanzonoj de Claude Piron |
| 28 | Vi mem proponu temon. |

Junio 2008

| | |
|---|---|
| 4 | Vi mem proponu temon. |
| 11 | Vi mem proponu temon. |
| 18 | Vi mem proponu temon. |
| 25 | Kunsido adiaŭa, lasta antaŭ ferioj. Rakontu pri feriaj projektoj. |

Septembro 2008

| | |
|---|---|
| 3 | Kunsido revena, unua post someraj ferioj. Rakontu pri ferioj. |




*EBG dato: 29 JAN 2003*


**Kvizo: Nomu ulojn en fotoj!**

(Paĝo 19)

## KOTIZ-TABELO 2008

| Nr. | Kodo | Kategorio kaj Kotizo | € | Rajtoj |
|---|---|---|---|---|
| | | **ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO** | | |
| 11 | MEM | Membro de EBG | 10 | Abono al "Aktuala" (organo de EBG) + partopreno en la vivo de la Grupo |
| 12 | MEM-R | Membro-junulo (ĝis 26-jara) | 5 | |
| 13 | MEM-S | Membro-pensiulo, senlaborulo | 7 | |
| 14 | FAK | Familia kunloĝanto | 2 | Partopreno en la vivo de la Grupo |
| 18 | DVM | Dumviva membro de EBG | 250 | Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo |
| | | **BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ** | | |
| 21 | APE | "Association pour l'espéranto" | 14 | Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva) |
| 22 | FEL | Flandra Esperanto-Ligo (FEL) | 25 | Membro+Abono al "Horizontaal" (grandparte nederlandlingva) |
| | | **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO** | | |
| 31 | SA | Abonanto de "Esperanto" | 37 | Abono al "Esperanto", monata organo de UEA |
| 32 | Kto | Abonanto de "Kontakto" | 23 | Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA |
| 33 | MJ | Membro kun "Jarlibro" | 23 | Membreco en UEA + "Jarlibro" |
| 34 | MA | Membro-abonanto de UEA | 58 | MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato ! |
| 35 | MG | Membro kun "Gvidlibro" | 9 | Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj) |
| 36 | SZ | Membro de Societo Zamenhof | 116 | Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA |
| 37 | MD | Dumviva Membro de UEA | 1450 | MA de UEA dum la tuta vivo! |






# ESPERANTO aktuala

INFORMILO DUMONATA de la ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

Majo - Junio 2008 *Nova Serio* N°3

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Claude Glady, cglady@arcadis.be, Abona membriĝo 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123048-52 Sekretario: Hélène Falk-Bracke, 7 rue des Chênes, 1640 Rhode StGenese, informas +3223584214, helene.falk@skynet.be; Kunvenkoko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK *(tie nek poŝtkesto nek telefono)* Informoj: http://users.belgacom.net/EBG http:/ebg.skynetblogs.be http://uea.org www.esperanto.be www.esperanto.net http://eo.eventeo.net

## ENHAVO

**Paĝo 2 - Hélène Falk-Bracke denove pri kosmografio**
**Paĝo 3 - Eric Baert pri Roterdamo**
**Paĝo 4 - Emile van Damme pri centjariĝo de EBG**
**Paĝoj 6/7 - Asembleo de BEF kaj Ukrainia vespero**
**Paĝoj 8/18 - Libroservo kaj membroj de UEA**
**Paĝo 12 - Projekto ABAKO**
**Paĝo 15 - Dana jubileo, Bjalistoko kaj Eventeo**
**Paĝo 16 - Fondiĝo de BESPA**
**Paĝo 19 - Kvizo**

## LA PAĜO DE HÉLÈNE FALK-BRACKE

**Pri Kosmografio: STELAROJ je nia latitudo (50° norde)**

**Granda Ursino : la Ĉinoj vidas en ĝi metalan paton.**

**La priskribo de la Eŭskoj (Basques) estas multe pli detala : « Iun tagon, du ŝtelistoj forprenis du bovojn (la 4 steloj de la kvadrato - la ŝtelistoj kiel la du unuaj, la bovoj kiel la du lastaj) .La malkvieta posedanto sendas sian unuan serviston por serĉi ilin (la unua stelo de la vosto) ; poste, li sendas sian duan serviston, kiu ankaŭ ne revenas (la lasta stelo de la vosto). Finfine, sakrante kaj blasfemante, li decidas serĉi mem kun sia hundo ; sed kiel puno de sia maldeca konduto, li devos vagadi eterne en la ĉielo kun la diversaj roluloj » Kial do li ne estas la tria stelo de la vosto ? Vi malbone rigardis ! la dua stelo estas duobla : estas la kamparano kun lia hundo !**
**Nur Grekoj kaj Romanoj asertas ke temas pri unu el la multaj malfidelecoj de Zeŭs (Jupiter) ; por sin venĝi, lia edzino Hera (Juno) aliigas la amatinon, la nimfon Kalisto, kaj ilian filinon en ursinojn.**
**Se vi plilongigas norden, kvinfoje, la du antaŭajn stelojn de la Granda Ursino,vi atingas la polusan stelon, ne tre brilan, kiu estas la fino de la vosto de la Malgranda Ursino, kies formo samas tiun de la patrino, sed en kontraŭa direkto.**

**+ + +**

**Oriono estas la plej bela, la plej granda stelaro de la vintraj noktoj. Januaro kaj februaro je la deka vespere estas la plej oportunaj momentoj, dum noktoj sen nebulo kaj sen luno . Ĝi aspektas kiel giganta diabolo en kies centra parto videblas 3 steloj, nomitaj aŭ la Balteo, aŭ la Tri Reĝoj.**
**Oriono estis sperta ĉasisto al kiu Artemisa (Diana) enamiĝis, sed li estis malfidela. Pro tio, ŝi ordonis al la Skorpio mortpiki lin. Tial, kiam Skorpio sin levas oriente, Oriono malaperas okcidente. Artemisa, kiu plu amis Orionon, aliformis lin en stelaron. Je la piedoj de Oriono kuŝas la Leporo, Proksime de la mastro, vi vidas liajn du Hundojn : la grandan, kun Siriuso (plej brila stelo de la ĉielo) ĉekape, kaj la etan Procionon. Je la okcidenta flanko, Oriono repuŝas la Taŭron, helpate de sia Ŝildo – la Plejadoj fuĝas antaŭ li….**

**Malfacile vidi en la ĉielo. Kompreneble, eĉ desegnaĵo helpus. Mi povus kunporti ĉielan mapon. Aŭ inviti vin, en mia ĝardeno, observi ĝin dum februara vespero, se la ĉielo estas sen nebuloj kaj sen luno. Sed, atentu ! Tiaj noktoj estas ege malvarmaj !**

**Hélène Falk**

*Sabaton 17 majo: Tradicia serĉpromenado en Gento*
*Informoj: 09/ 230 16 77 „www.esperanto.be/gent“*



## EBG Kunsido 29-01-2003



**Kvizo: Ulojn fotitajn kapablas vi nomi. Kiom da?**

## UEA SUB 6.000 INDIVIDUAJ MEMBROJ

**Dum la jaroj 2003-2005 la membrokvanto de UEA evoluis pozitive, sed dum la lastaj du jaroj denove rimarkeblas ioma malkresko. La kvanto de individuaj membroj tamen falis nur marĝene, de 6.107 en 2005 al 6.066 en 2006. Por la pasinta jaro la kvanto de indivuaj membroj ĝis nun ne atingis la magian limon de 6.000, sed la ĝenerala direktoro esperas, ke malfruaj aliĝantoj savos la statistikon de 2007.**




**Je la fino de la jaro 2007 la kvanto de individuaj membroj estis 5.965, sed du semajnojn poste ĝi jam kreskis al 5.977, rakontas Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, en la reta diskutejo de la komitato de UEA. Osmo Buller instigas la komitatanojn streĉi siajn fortojn kaj instigi esperantistojn ankoraŭ pagi kotizon por la pasinta jaro.**

**La falo en la membronombro grandparte okazis ĉe la junaj membroj. Laŭ Osmo Buller, la falon klarigas tio, ke la Internacia Junulara Kongreso pasintjare okazis en Vjetnamio, kaj sekve multaj eŭropaj gejunuloj ne partoprenis ĝin kaj lige kun tio ankaŭ ne pagis kotizon al TEJO, la junulara sekcio de UEA. En 2006 estis 515 junaj individuaj membroj, sed pasintjare nur 387 - diferenco de 128.**

**La okazigo de la Universala Kongreso en Japanio same kaŭzis, ke multaj pli aĝaj eŭropaj esperantistoj ne povis kongresi, kaj lige kun tio ankaŭ ne pagis sian kotizon.**

**Aliflanke aliĝis al UEA rekorde multaj japanoj. La kvanto de individuaj membroj de UEA en Japanio pli ol duobliĝis de 410 al 859, kaj tiel Japanio pasintjare estis la lando kun la plej multaj individuaj membroj de UEA. En 2006 plej multajn individuajn membrojn, sume 670, havis Francio.**

www.liberafolio.org



## Eric Baert, ano de EBG, skribis pri Roterdamo: "Espereble, la partoprenontoj al la UK povos viziti la urbon"



En 1970 mi unue venis al tiu urbo ; kiam mi vidis la grandajn konstruaĵojn apud la Centra Stacidomo, mi reiris kaj prenis trajnon al Amsterdamo. Fakte mi venis ripozi kaj ŝangi miajn ideojn por kelkaj tagoj ; mi venis buse de Mol al Turnhout, kaj de tie al Breda, kaj trajne de Breda al Roterdamo. Poste mi iris por la laboro en la haveno de Roterdamo, en Spijkenisse (eĉ per la metroo oni povas atingi tiun lokon) ; kaj mi iomete studis kio okazis en tiu urbo.

Dum la 2-a mondmilito la Germanoj ĵetis bombojn sur la centro de la urbo kaj ili prenis la gruojn de la haveno ; sed multaj domoj, kiel tiu de UEA, kaj la malnova haveno « Delfshaven » ne estis detruitaj. Dum la milito, multaj Nederlandanoj helpis por formeti la restaĵojn de la domoj ; kaj tial  ne estis devigitaj labori en Germanio. Pri tio, oni povas viziti ekspozicion en la preĝejo St Laurent. Post la milito, kelkaj arkitektoj rekonstruis la novan urbon : kaj nun oni povas vidi la novajn konstruaĵojn : la nunaj famaj arkitektoj nomiĝas Rem Koolhaas (1944) kiu konstruis grandan domon apud la stacidomo Lille-Flandres kaj faris proponon por renovigi la t.n. « trou des Halles » en Parizo, kaj Caroline Bos (1959). Nun oni diras ke R estas la urbo de arkitekturo. En la konstruaĵo « City informatiecentrum » vi vidas miniaturan modelon de la urbo, kaj la planojn por la estonteco. Vi povas viziti la Urbdomon kaj la Poŝtoficejon, kiuj ne estis detruitaj dum la milito, kaj la « World Trade Center “ kie estas multaj fotoj. Estas grandaj vendistoj en la Borso ; kaj Witte de Withstraat kie oni vendas pentraĵojn. Oni povas viziti la mar- kaj ŝip-muzeon, kun malnovaj gruoj ; proksime estas 3 konstruaĵoj kiu dum la nokto estas blua, blanka kaj ruĝa kiel la nederlanda flago. Roterdamo signifas la digo apud (la rivero) Rotte ; tiu rivero fluas tra la urbo proksime de la preĝejo St Laurent, kaj unu fojon venante bicicle de la urbo Alphen aan den Rijn mi vidis la riveron ekstere de la urbo en tre ĉarma cirkaŭaĵo, en kiu loko diversaj japaninoj pentris. Oni povas viziti la kubajn domojn kaj la turo « het potlood (la krajono) » konstruita de Piet Blom (1934-1999) ; ne konfuzu lin kun la belga arkitekto Adrien Blomme (1878-1940). Oni povas vidi la samajn konstruaĵojn en Helmond, (proksime al Eindhoven). Proksime vi povas vidi la malnovan konstruaĵon Westermeyer. Oni povas vidi « De Hef » ; antaŭe (ĝis 1980 +-) la trajnoj trairis la riveron per ponto, kaj tiu levanta ponto permesis al la ŝipo iri sur la rivero. Nun la trajnoj iras per tunelo sub la rivero « Nieuwe Maas », kiel la metroo. Kaj poste vi povas iri per la Koninginnebrug (ponto de la Reĝino). Tie estas monumento al la Judoj, kaj malnovaj staploj kiuj nun estas apartamentoj kaj restoracioj.  Tie vi vidas juĝejon, kaj grandajn konstruaĵojn . En la urboparto „Kop van Zuid”vi povas vidi la malnovan hotelon New-York. Tie vi povas reiri per la ponto Erasmusbrug. Vi povas viziti la domon Sonneveld, kaj la Nederlandan Arkitekturinstituton (Rochussenstraat). Vi povas viziti la konstruaĵon LLOYD: malnova elektra centralo kie nun oni konstruas apartamentojn, hotelon kaj kinejon. Vi povas viziti Schiedam per metroo, kaj reveni per tramo, kaj halti en Delfshaven. Per boato vi povas viziti la havenon, la kontener-havenon kaj la ŝipriparejojn . Eĉ oni povas vidi la petrol-fabrikon en Pernis. La oficejo de la turisma boato estas apud la ponto Erasmus. Oni konstruis grandan baraĵon por protekti Roterdamon se la maro estus tro dangera, apud Rozenburg. La naturamikoj havas 2 domojn en Vlaardingen kaj Hoek van Holland. Aliaj aferoj por viziti: Kralingse plassen, strukturo en la Pompenstraat inter Hoffplein kaj la stacidomo; museo de la transportoj Oostplein, Goudsesingel ; Oostmolenweg, Euromast, Westzeedijk, Park. Espereble, la partoprenontoj al la UK iomete povus viziti la urbon anstataŭ paroli en la salonoj.

***Eric Baert*** *, pri vojaĝo 10-12/01/2007*

# CENTJARIĜO ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO - EBG

Kiam kun la nesciado de novulo mi akceptis de la manoj de s-ano Fighiera la prezidantecon de la EBG, mi tute ne antaŭvidis, ke dudek jarojn poste la Grupa Centjariĝo postulus de mi la retroaktivan kvaliton de arkivisto. Car bedaŭrinde mi ne posedas tian kvaliton, mi ne zorgeme konservadis datenojn pri tiu mia prezidanteco. Repensante pri tiu periodo mi nun konscias, ke mi ĉiam multe pli koncentris mian agadon sur la pedagogian kaj kulturan flankojn de la,prezidanta ŝarĝo ol sur la administran parton. Mi do povas nun nur konjekti pri la dato de mia prezidantiĝo. Bonŝance, danke al la kunlaboro de s-ano Marc Demonty, ni povis kompari kun aliaj pasintaj eventoj kaj konkludi, ke devas esti ĉirkaŭ la jaroj 1975-77, ke s-ano Fighiera provis konvinki min, ke malgraŭ mia esperantista novbakiteco, mi povus postsekvi lin.
Pri mia tutunua kontakto kun Esperanto mi tamen bone memoras. Ĝi okazis jam en mia dekkvara jaro, kiam tre maljuna praonklo montris al mi la fundamentan Iibreton kaj samtempe stenografian skribmetodon. Bedaŭrinde, aŭskultante sole mian energi-ŝparemon, mi tiam elektis stenografion, kiu ja ebligus min noti miajn kursojn per nur kelkaj strek- kaj kurbetoj. Fino de la klopodoj elskribi tekstojn tutlitere!
Esperanto devis do fete atendi sian tempon, kiu venis kelkkvardek jarojn poste. Iĝinte lingvoinstruanto kaj ade konstatante la lernmalfacilecon de miaj gelernantoj koncerne lingvojn, mi donkiĥote provis ellabori helplingvon surbaze de nur grekaj kaj latinaj sciencaj radikoj (tiutempe mi ne sciis pri la ekzisto de Glosa). Poste mi trafis ian esperantan lernolibron kaj, ĉar jam ekzistis la monda reto de la Esperanta movado, mi decidis eniri tiun vojon.
Mia unua kontakto kun esperantistoj okazis iun malhelan pluvan vesperon en subtera (?) ĉambro de iu konstruaĵo de la brusela Reĝa Placo. Tie mi trovis kelkajn gemembrojn kunsidantajn cirkaŭ tablo, iom konspirmaniere. Mi pensas, ke ĉeestis tie i.a. gesinjoroj Jacobs, s-inoj Ernst, Ada Sikorska, eble ankaŭ s-ino Opsomer kaj du aŭ tri aliaj. Tiel komenciĝis elektita kariero en Esperantujo, kiu, fakte, je mia plena kontentiĝo, ankoraŭ ne trovis sian finon.
Post duopo da jaroj, verŝajne en 1977, s-ano Fighiera proponis al mi anstataŭi lin en la funkcio de prezidanto. Ĉar, responde al mia rifuzo, li klarigis, ke pro lia profesio, li devos ofte labori eksterlande, mi finfine jesis. Mia unua tasko estis trovi novan taŭgan kunvenejon por kursoj kaj kunvenoj. Post pluraj sensukcesaj klopodoj, mi trovis en la centro de Bruselo (favora situo por Bruselanoj el ĉiuj ĉirkaŭaj antaŭurboj) kvazaŭ abondonitan domon, proprietaĵon de la urbo. Finfine EBG havus propran kunvenejon!
Unu detaleto tamen rolis kiel mezurilo de la entuziasmo de la partoprenantoj. Ne temis pri moderna versio de la terura admono de Dante en sia Divina Komedio (*« Lasciate ogni speranza, voi ch'entrate »; itale : enire, lasu for esperon ĉian*), sed pri samtempe fizika kaj psika testo: transpasi la sternitajn korpojn de snifantaj fi-droguloj. Notu, ke ne temis pri kadavroj, kio mildigis iomete la hororon de kelkaj samklubaninoj. Estas sendube danke al tiu detalo, ke niaj tieaj kunvenoj restas firme gravuritaj en la memoro de la partoprenintoj, eble pli firme, mi treme pensas, ol miaj kursoj.



## Muhammad Mahbubul Huq fondis BESPAn en Daka, Bangladeŝo, ĵus post partopreno de la 5a Azia Kongreso, Bangaluro, Barato






## Fondiĝo de BESPA la 21_an de Februaro 2008, samtempe oni honoris martirojn de lingvaj rajtoj dum festo de la gepatra lingvo.








Aliflanke, ĉu ne kortuŝa, ke ĉirkaŭ la jaro 1980, kiam la Esperanto-projekto devus esti jam de jaroj enterigita, ge-Bruselanoj ankoraŭ riskis la ... transpason? Sed estis ankaŭ kompensoj: de la partoprenintoj ofte rememorigita aspekto de tiu pionira periodo estas la postkursa komuna trinko en apuda tute deca trinkejo.
Por aldoni ludan komponanton al la kursaro, mi tiam skribis kurson uzante kiel kurslibron la faman Tinĉjo-volumon "La Krabo kun oraj pinĉiloj". Jen ĉi-jare amuza detalo, ĉar la centjariĝo de EBG koincidas kun tiu de la naskiĝo de Hergé, la kreinto de Tinĉjo!
Tiutempe aliĝis al la grupo juna inĝeniero, s-ano Meijer. Li volonte ekokupiĝis pri administraj aferoj, ĉeestis komitatkunvenojn, redaktis protokolojn de la kunsidoj tiom volonte kaj zorgeme, ke ni interkonsentis plenumi la prezidantecon laŭ rotacia principo. S-ano Meijer estis do prezidanto de EBG dum unu aŭ du jaroj. Malfeliĉe mi baldaŭ devis repreni tiun ŝarĝon, ĉar li edziĝis kaj ili elmigris al Kanado. Ankoraŭ nun ili ĉiujare sendas novaĵojn pri sia vivo tie.
Mi memoras, ke ni ĉiam klopodis por organizi iom solenan Zamenhof-feston, kun prelego kaj komuna manĝo. Unufoje ĝi okazis eĉ en salono de la pola ambasadejo, plurfoje en la festa salono de la flandra kunvenejo De Markten, apud la Sankta-Katerinaplaco, kaj ankaŭ en kulturdomoj de bruselaj suburboj. Krome, kune kun s-ano Demonty ni iam organizis kurseton en la domo de s-ro Bucquoi, kaj en iama privata kulturdomo kies nomon mi ne plu memoras, en la sama Sankta-Katerinaplaco.
La kluba vivo draste ŝanĝiĝis, kiam areto do gesamklubanoj, oficistoj ce la Eŭropa Komunumo, fondis tie Esperantogrupon agnoskitan de la Komunumo kaj rajtigitan uzi unu el ties kunvenejoj en la Kortenberg-avenuo. Komenciĝis tiam vigla periodo de kursoj kaj altkvalitaj prelegoj, ofte kun projekcio de lumbildoj. Ĝi bedaŭrinde finiĝis, kiam la EK decidis ne plu uzi la tiean domon. Intertempe s-ano André Mertens akiris domon en la Leopoldo-2a-avenuo. Li mem kaj parto de la geklubanoj ludadis tiam kun la regule revenanta ideo, ke tie konstanta Esperanto-oficejo povus esti instalita, sed variaj peripetioj malebligis tion.
En la jaro 1994 s-ano Angelos Tsirimokos akceptis la prezidantan torĉon, kio ligas nin pli firme al la Eŭropa Komunumo kaj klare elmontras la internacian alvokiĝon de Esperanto. Miaflanke mi ĝojas tutkore danki la multajn gesamideanojn, kiuj ebligis mian agadon en la sino de EBG: unue la vicprezidantinon Barbara Poterucha, la sekretariinon Christiane De Vleminck, mian fraton Frans, kasiston, la respondeculojn pri la bulteno, Eugene Collet, Leo Debruyne kaj poste s-inon Hélène Falk, kaj multajn aliajn. Dankon al ĉiuj!

**Emile van Damme**

## Anonco

En la Kulturdomo de Dilbeek (Westrand) kunvenas ĉiumonate Esperanto konversacio-rondo, (ĉiam je unu sabato, de 14.30h ghis 16.30h). Informoj kaj datoj ĉe Emile Van Damme, tel. 02.569.17.83 aŭ rete : em.vandamme@pop.skynet.be.

***Emile Van Damme** retmesaĝe 01/03/2008*









## *Dana Esperanto Asocio festis 100 jara jubileo 19-04-2008 (foto)*




## BJALISTOKO

**La urbo Bjalistoko, kie naskiĝis Ludoviko Zamenhof, decidis proprakoste renovigi historian konstruaĵon ĉe la strato Warszawska 15 kaj destini ĝin por la sidejo de Esperanto-Centro. Laŭ la plano la Esperanto-centro devas esti preta kaj ekipita por inaŭguro dum la Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko en julio 2009.**

**Laŭplane la nova Esperanto-centro portos la nomon de Ludoviko Zamenhof, kaj estos inaŭgurita la 25-an de julio 2009. En la buĝeto de la komunumo por la jaro 2008 estas fiksita la sumo por la rekonstruado de la historia konstruaĵo ĉe la malnova strato Warszawska.**

**En septembro 2008 ĉiuj legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo Gazeta Wyborcza ricevos kun la gazeto ankaŭ kompakt-diskon kun kurso de Esperanto kaj ampleksa prezento de la Esperanto-movado. La diskon laŭ mendo de la urbo Bjalistoko produktos la teamo de E@I (ikso.net), kaj la eldonon financos la urbo mem. La eldono de la disko estas parto de granda informa kampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo Bjalistoko lige kun la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof en 2009. Tiamaniere ricevos Esperanto-kurson fakte 400.000 poloj.**


*www.liberafolio.org/2008/bjalistokacentro*

## *Eventeo estas nova eleganta novaĵretejo http://eo.eventeo.net*

**Antaŭ kelkaj tagoj komencis funkcii "Eventeo", la nova internacia novaĵ-portalo en Esperanto, kie ĉiutage aperas novaĵoj, artikoloj el diversaj kontinentoj de la mondo. Por vizitantoj donas tre agrablan impreson la strukturo de la portalo, la stilo kaj nivelo de la uzata lingvo, kaj ankaŭ la modesta sed eleganta aspekto. La portalo ankoraŭ estas en testa reĝimo, mankas eĉ la kolofono en la ĉefpaĝo, do la nomoj de personoj en la funkciiga teamo ankoraŭ ne estas publikigitaj. Pere de interna mesaĝilo bonvenas kunlaboro de eksteraj aktivuloj, helpantoj kun bona lingva nivelo. Multan sukceson kaj longan vivon al la nova Esperanta portalo!**

**Szilvási László**, *www.eventoj.hu*

Oni vidas, ke laŭ tiu skalo la esplorataj lingvoj ordas en la tuttera teksaĵo de la plej granda slovena lingvo, al Esperanto, eŭska, kimra, latina, ĝis la plej malgranda malta. Tiu ordo konserviĝis tra la tuta enketo en ĉiuj serĉiloj, krom pri la kimra kaj eŭska, kiuj interŝanĝis la rangojn, tamen ĉiam restante proksimaj. La grandec-diferenco estas de 5 al 1: la slovena prezentas proksimume kvinoble la nombron de paĝoj en la malta.
Ankaŭ ido (io) kaj interlingvao (ia) estis esplorataj en "Abako". La rezultoj ne aperis publike pro du kaŭzoj: unue la linioj de tiuj lingvoj ne videblus en la grafiko, ĉar ili rampus sur la grundo, kaj due la serĉado de retpaĝoj en tiuj lingvoj ne facilas. Ido kaj eĉ pli interlingvao estas en interreto travideblaj: ili tiom similas al latinidaj lingvoj, ke iliaj oftaj vortoj aperas ankaŭ en hispanaj, italaj, katalunaj aŭ francaj paĝoj. Ili do devis esti esplorataj per pli multaj, aŭ malpli oftaj vortoj. Idajn paĝojn oni kaptis per "pri dil anke la di", interlingvaajn paĝojn per "habeva que". Plie, se vere serĉiloj blufas, estas atendeble, ke ili malpli blufas kiam la respondonombroj malaltas kaj iĝas trakontroleblaj de demandantoj. Pro tiuj kaŭzoj la paĝonombroj de ido kaj interlingvao estas verŝajne subtaksataj.
Malgraŭ tiuj embarasoj, la rezultoj estas sufiĉe signifaj.





Ido kaj interlingvao klare ludas en tute alia kategorio ol esperanto. Ili ŝajne prezentas inter 100- kaj 300-oble malpli da retpaĝoj ol ĝi.
Tiu kontrasto eble gajigos iujn, sed oni povas dubi, ĉu tio estas priĝojinda fakto. Esperanto en antaŭvidebla estonteco daŭre logos homojn, kiel ĝi logis ilin dum pli ol cent jaroj, eĉ se neniu povas diri per kiu aparta ĉarmo. Sed idon kaj interlingvaon povas trafi simple tio, kio pereigis okcidentalon antaŭ kelkaj jardekoj. Se iuj gvidantoj rezignos, se en iu momento nesufiĉe da aktivuloj kuniĝos, la lingvoj malaperos pro neinteresiĝo de homoj. Kun tio malaperos ankaŭ parto de la planlingva historio.
Tiu lasta observeto instigu esperantistojn al praktiko de la lingvoprotekta politiko, kiun ili tiom ofte rekomendas: se ili volas kompreni sian historion kaj sin mem, ili pripensu helpon al transvivo kaj konserviĝo de aliaj planlingvoj. Laŭ la vojo de CDELI kaj malmultaj aliaj institucioj, projektoj por eldono, studo kaj arkivado de esperantaĵoj malfermiĝu al duonsukcesaj planlingvoj, tiel ke tiu eta valora perlo de homa invento – kreitaj lingvoj – konserviĝu por estonteco kaj instruu al nia maŝinema mondo, ke krom teĥnikaj solvoj kaj belaĵoj, ekzistas ankaŭ kelkaj intelektaj.

***Ĵeromo Vaŝe** en http://www.liberafolio.org*



## *UKRAINIA VESPERO.*

*Dum la semajna kunveno de EBG, merkrede, la 23a de Aprilo, Doktoro Kostjantin Demjanenko prelegis pri Ukrainia esperanta movado kaj pri konservado de fiŝaj stokoj en Azova maro. Muzikistinoj Maria kaj Silvia ludis kaj kantis ukrainajn kantojn.*








# Libroservo de UEA - resumaj ciferoj pri la vendoj

Per "Vojaĝo en Esperanto-lando" akademiano Boris Kolker fariĝis ĉampiono de la Esperanta libromerkato ankaŭ en la jaro 2007. Lia perfektiga kurso, kiu samtempe estas enkonduko en la Esperanto-kulturon, gajnis la unuan lokon jam en la sesa sinsekva jaro, kio ne sukcesis al alia libro dum tiuj pli ol 30 jaroj, dum kiuj la Libroservo de UEA aperigis furorlistojn de siaj vendoj. Ekde 2002 vendiĝis 2568 ekzempleroj de la libro de Kolker; el ili 295 pasintjare.

Ĉi-kune aperas du listoj. Tiun de totalaj vendoj influas kvantaj mendoj de aliaj libroservoj. La alia listo dokumentas unuekzemplerajn vendojn al individuaj klientoj poŝte aŭ surloke en Roterdamo. En la listo de ĉiuj vendoj estas 11 eldonaĵoj de UEA/TEJO; en tiu de unuopaj vendoj ili estas 8 el 20. La vendoj en la kongresa libroservo estas enkalkulitaj en la statistiko de ĉiuj vendoj.

La adresaro de Pasporta Servo, tradicia rivalo de Kolker, vendiĝis en 276 ekzempleroj. La reeldono de "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat en redakto de Ulrich Lins, kvankam aĉetebla nur ekde aŭgusto, atingis la trian lokon (245). Ĝin sekvas "Lingvo kaj popolo" de Humphrey Tonkin (232), kiu siavice staras ĉe la pinto de unuekzempleraj vendoj (44). Tre sukcesan lanĉon spertis la lernolibro de Stano Marček, "Esperanto per rekta metodo" (179). Ĝi aperis ankaŭ en multaj aliaj lingvoj, el kiuj la japana eldono, evidente dank' al la vendado en la UK, sukcesis eniri la liston de totalaj vendoj.


Ĉar diskoj kutime ne atingas furorlistojn, estas notinde, ke la abund-enhava "Esperanto elektronike" eniris la grandan liston por la dua fojo kun 111 vendoj. Ĝojiga estas ankaŭ la sukceso de la unua volumo de "Beletra Almanako", kiu aperis sur la merkato fine de septembro sed malgraŭ malmulta tempo atingis la kvaran lokon ĉe unuopaj vendoj (34 ekz.).

La vendoj sumiĝis je 121 172 eŭroj. Kompare kun la bona jaro 2006 okazis malkresko de 12 747 eŭroj pro la tradicie malpli bona debito de la kongresa libroservo, kiam UK okazas ekster Eŭropo. Hazarde la vendosumo preskaŭ precize egalas tiun en 2004, kiam la antaŭan fojon la UK okazis en Azio kaj la vendoj sumiĝis je 121 374 eŭroj. La Libroservo de UEA vendis entute 2214 diversajn titolojn. Nur de 84 el ili estis venditaj pli ol 10 ekzempleroj kaj 1080 vendiĝis nur en unu ekzemplero, dum 3306 titoloj allogis dum la jaro neniun klienton.

VENDOJ ENTUTE

| ekzempl. | |
|---|---|
| 295 | "Vojaĝo en Esperanto-lando", B. Kolker * (EUR 18,00) |
| 276 | "Pasporta Servo", listo de gastigantoj * (EUR 15,00) |
| 245 | "Vivo de Zamenhof", E. Privat * (EUR 9,00) |
| 232 | "Lingvo kaj popolo", H. Tonkin * (EUR 14,10) |
| 179 | "Esperanto per rekta metodo", S. Marček (EUR 8,10) |
| 138 | "Afero de espero", H. Goes * (EUR 9,00) |
| 137 | "Saluton!", A. Childs-Mee * (EUR 10,80) |
| 113 | "Internacia Kongresa Universitato 2007", red. A. Wandel * (EUR 12,00) |
| 111 | "Esperanto elektronike", komputila dvd (EUR 9,00) |
| 109 | "Gerda malaperis!", C. Piron (EUR 5,70) |
| 99 | "La Komuna Eŭropa Referenckadro", div. aŭtoroj * (EUR 3,00) |







Se la evoluo de paĝonombroj tra 2006-2007 konformus al la frua ĵurnalisma mito pri interreto, ĝi konstante kreskegus. Tiel ne okazis. Fine de jaro 2006, la slovena kaj esperanta lingvoj ŝajne eĉ malkreskis je 3 kaj 31 elcentoj respektive. Post du jaroj, la anoncitaj paĝonombroj pli-malpli duobliĝis por ĉiu lingvo kompare kun la komenca stato.

La precipan zorgon por interpretado tamen kaŭzas ne la entuta evoluo, sed iuj abruptaj varioj: de monato al monato oni vidas kreskojn kaj malkreskojn, kiuj ŝajnas simple nekredeblaj. Eventuale oni akceptos, ke Google novigis siajn indeksojn en 2006-04, kaj subite trovis 9,53 milionojn da paĝoj por la slovena lingvo post 1,76 milionoj en 2006-03, sed kiel povis okazi, ke jam en la sekva monato, ĝi trovis nur 3,92 milionojn? Retpaĝoj ne tiom amase kreiĝas aŭ pereas.

Cetere, estas klare, ke tiuj ŝanĝoj okazas ne en la realo sed ĉe la serĉiloj mem: ĉe Google nombroj grandiĝas ĝuste sammonate por ĉiuj esplorataj lingvoj, dum ili samtempe malgrandiĝas ĉe Yahoo! Yahoo – aŭ ĝia ombro Altavista – malpli fantaziis, sed ĝi okaze pretendis trovi post unu monato +235% da esperantaj paĝoj (de 2006-07 al 2006-08) aŭ -54% da maltlingvaj paĝoj (de 2006-09 al 2006-10). La krutaĵoj de la grafikoj montras, ke ne nur la absolutaj nombroj, sed eĉ la evoluoj anoncitaj de serĉiloj estas apenaŭ fidindaj.

Se nek absolutaj nombroj nek evoluoj fidindas, kio restas? Restas la relativaj nombroj, la komparoj inter lingvoj. Por tio ni povas uzi mezumon de la rezultoj trovitaj dum la du jaroj.



# PROJEKTO ABAKO

"Abako" estas eta projekto, kiu dum du jaroj statistike observis la uzon de Esperanto en interreto. Ĝi esploris krome kvinon da aliaj, proksimume samgrandaj lingvoj. Por ĉiu lingvo ĝi registris la nombrojn de retpaĝoj trovitaj per serĉiloj en ĉiu monato. Oni povas per singarda interpreto de la rezultoj konjekti pri la vigleco de la lingvo internacia en la tuttera teksaĵo kaj malrekte ankaŭ pri la nombro de esperantistoj.
Dujara lingvostatistika observo de retaj serĉiloj montras interalie, ke la mezuma nombro de retpaĝoj en Esperanto estas klare pli alta ol en la eŭska, sed multe malpli granda ol en la slovena. Se la proporcio inter la kvanto de parolantoj kaj kvanto de retpaĝoj estus la sama en ĉiuj lingvoj, oni povus konkludi, ke la kvanto de esperantoparolantoj superas milionon. Ĵeromo Vaŝe, kiu raportas pri sia esploro en Libera Folio, tamen avertas kontraŭ tro certaj konkludoj: "Ni memoru ĉiujn proksimumojn, de kiuj tiu takso dependas: retserĉiloj respondis parte fantazie, ili egalanime enkalkulas paĝojn en malbonkvalita lingvo, ni iom arbitre supozis ke la kimra kaj eŭska estas modelaj por nia kalkulo... Aparte ĉi lasta supozo estas kritikinda: parolantoj de provinca lingveto trovas kunparolantojn najbare kaj ne tre bezonas retpaĝojn por komuniki."
Enketoj pri la rangoj de diversaj lingvoj en interreto malmultas. Iom malnova esploro montras Esperanton en jena parto de rezultolisto:




- Gaela 49 778 000
- Estona 43.257.000
- Latina 38.256.000
- Eŭska 28.296.000
- Esperanto 26.795.000
- Latva 21.925.000
- Litova 20.927.000
- Bretona 9.975.000
- Albana 9.203.000
- Kimra 7.590.000

... Kiel komparolingvoj estis uzataj (de ABAKO) la slovena (sl), la eŭska (eu), la kimra (cy), latino (la) kaj la malta (mt). Kiel tipaj serĉovortoj estis uzataj respektive "tudi lahko", "eta dira izan", "mae hefyd", "atque cum quod", "biex fuq". Ĉi tiuj listetoj estis konstruitaj per kalkulo de oftecoj el kelkdekmilvortaj tekstoj.
Aliaj kandidataj lingvoj montriĝis aŭ senkompare pli abundaj en interreto – ekzemple la kataluna – aŭ tro konfuzeblaj – ekzemple la korsika, apenaŭ distingebla de la norma itala. La fine konservita lingvaro sufiĉe proksimas al Esperanto laŭ nombro de retpaĝoj.
Alia konveno estis la kontrasto inter du ŝtataj lingvoj: slovena kaj malta, du neŝtataj: eŭska kaj kimra, kaj du nenaciaj: latina kaj esperanta. Tio eventuale observigus malsamajn evoluojn pro la pli aŭ malpli forta subteno fare de institucioj. La naciaj lingvoj estas lingvoj de eŭropaj mezriĉaj landoj, kio pli-malpli spegulas la situon kaj situacion de esperantistoj rilate al havo de komputiloj, aliro al interreto kaj emo krei retpaĝojn. Iom apartas la malta lingvo, estante verŝajne parolata de popolo malpli riĉa, do subreprezentata en interreto.



99 "Vikipedio praktika manlibro", red. Y. Nevelsteen (EUR 3,00)
90 "Historio por malfermi estontecon", div. aŭtoroj (EUR 15,00)
89 "Pocket Esperanto Dictionary", A. McLinen * (EUR 15,00)
84 "Mil unuaj vortoj en Esperanto", H. Amery (EUR 12,00)
74 "Tyokusetuhou de manabu esuperanto nyuumon", S. Marček (EUR 7,50)
73 "Plena manlibro de Esperanta gramatiko", B. Wennergren (EUR 27,00)
72 "Japanio kalejdoskope", div. aŭtoroj (EUR 5,40)
66 "Faktoj kaj fantazioj", M. Boulton * (EUR 13,80)
55 "Konciza etimologia vortaro", A. Cherpillod * (EUR 21,60)

## VENDOJ UNUOPAJ

ekzempl.
44 "Lingvo kaj popolo", H. Tonkin * (EUR 14,10)
43 "Pasporta Servo", listo de gastigantoj * (EUR 15,00)
40 "Plena manlibro de Esperanta gramatiko", B. Wennergren (EUR 27,00)
34 "Beletra Almanako 1" (EUR 10,50)
33 "Vivo de Zamenhof", E. Privat * (EUR 9,00)
27 "Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005" (EUR 87,00)
27 "Vojaĝo en Esperanto-lando", B. Kolker * (EUR 18,00)
26 "Esperanto per rekta metodo", S. Marček (EUR 8,10)
25 "Konciza etimologia vortaro", A. Cherpillod * (EUR 21,60)
25 "Afero de espero", H. Goes* (EUR 9,00)
24 "Informado praktike", Z. van Dijk (EUR 15,00)
22 "Biblio" (EUR 20,10)
20 "Esperanto elektronike", komputila dvd (EUR 9,00)
20 "Vikipedio praktika manlibro", red. Y. Nevelsteen (EUR 3,00)
19 "Historio de Esperanto", A. Korĵenkov (EUR 12,00)
19 "Relativeco per bildoj", W. Atkinson (EUR 9,30)
19 "La Komuna Eŭropa Referenckadro", div. aŭtoroj * (EUR 3,00)
17 "La bona lingvo", C. Piron (EUR 13,50)
17 "2 paroladoj de Ivo Lapenna", vol. V, kd (EUR 13,50)
17 "Esperanto k lingva diverseco", C. Hagège & F. Lo Jacomo * (EUR 2,70)
* Eldonaĵo de UEA/TEJO. La prezoj estas aktualaj nerabatitaj vendoprezoj.

el Gazetara Komuniko de UEA, 2008-02-25 ; Foto: Centra oficejo en Roterdamo



# KIE ESPERANTUMI BALDAŬ

**1 - 4. majo** - Esperantista Primavero " EsPrimo-5" tradicia Ural-Siberia regiona renkontiĝo en Jekaterinburg, la ĉefurbo de Uralo, kun ĉefa temo: "Kunagi fervore, inspire kaj kore!". Inf: Raja kaj Viktor Kudrjavcev, komencanto@r66.ru, tel: +7-343-3814250 aŭ Aleksandr Osincev amico86@mail.ru tel: +7-902-2603613; Galina Terentjeva galater@74.ru tel: +7-351-2638023
**1 - 4. majo** - Krokodila Renkontiĝo en francaj Pireneoj. Ni kune amuziĝos en juna, internacia etoso
**1 - 5. majo** - Unua kongreso de serbiaj esperantistoj Niŝ, Serbio. Inf: Zoran Ĉiriĉ, zciric@EUnet.yu
**1 - 11. majo - 20-a Esperanto-festivalo "Aroma Jalto", Ukrainio. Inf.:p/k35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio.** tel.h.+380-44-2851701, tel. m.+380674403172; rete: volodomir@ukr.net
**1. majo - 15 oktobro** - Someraj Esperanto-Ripozoj ĉe Nigra Maro, Bulgario. Inf: Burgas, kv. Krajmorie, str. Ĉernomorka 9, Bulgario. Tel.: +359-(0)56/89-00-10, GSM 359-(0)877-46-41-88. rete: modest@abv.bg
**2 - 4. majo** - Staĝo pri parolata esperanto en lorena vilaĝo Vigy apud Metz. Inf: tel.: Tel;: +33(0)3 82 53 25 47, rete: esperanto-thionville@laposte.net
**5 - 9. majo** - Interkultura Semajno kun prelegoj pri interkulturaj temoj, diskutoj, muziko en la germana (per ICH) Inf: ICH, Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg/Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
**8 - 12. majo** - Komuna kongreso de francaj asocioj kun la temo "Lingvoj kaj kulturoj en Mediteraneo" en Martigues apud Marseille. Inf.: mcerisay@gmail.fr
**9 - 11. majo** - Brita Kongreso de Esperanto en Southport, Britio. Inf: Tel: +44-(0)1782-372141 rete: eab@esperanto-gb-org
**9 - 12. majo** - 85-a Germana Esperanto-Kongreso en Essen. Temo: Malkovru viajn antaŭjuĝojn. Inf.: Christian Darbellay, Esperanto-Kiel, Kaiserstr. 39, DE-24143 Kiel, Tel. +49-431-737788, Esperanto-Kiel@gmx.de
**16 - 18. majo** - Rodanalpa Regiona Kongreso, FR-26560 Mours Saint Eusebe, Francio. Inf.: rodanalpa.federacio@yahoo.fr
**17. majo - Tradicia serĉpromenado en Gento, Belgio.** Inf.:+32-(0)9/230 16 77
**17 - 24. majo** - 60-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio en Poznano, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodległości 8A, PL-61-875 Poznań, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl
**23 - 25. majo** - Tutslovakia esperantista renkontiĝo en la kabano Agrikop, Snina, orienta Slovakio kaj kongreseto de SKEF, porturista seminario kaj ekskursoj
**24 - 28. majo** - Postkongreso de la 60-a Kongreso de IFEF en Malbork, Białystok, Pollando. Inf: Dom Kultury "Kolejarz" al. Niepodległości 8A, PL-61-875 Poznań, Pollando. Tel.: +48-601703231, fakso: +48-61-6331595, rete: pefa@op.pl
**26 - 30. majo - Tutmonda kongreso de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius, Litovio. Temo: "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". Inf: Litova Esperanto-Asocio,** pk 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Telefono (portebla): +370-687-12219, fakso +370-37-228616, reto: litova.ea@mail.lt
**29. majo - 1. junio** - Internacia Mara Esperanta Renkontiĝo (IMER) en Krajmorie, Bulgario. Temo: "Originala Esperanto-literaturo", lekcioj, debatoj, distraj vesperoj, ekskursoj. Inf: Georgi Mihalkov, BG-1229 Sofio, ž. k. Nadežda V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario, tel: (02) 934-42-55, poŝtelefono: + 359 0889-137-555, rete: modest@abv.bg



**1 - 7. junio** - Turismo, kulturo, historio - internacia esperanto-aranĝo en Carevo (ĉe Nigra Maro, Bulgario). Inf: inĝ. Boris Vasilev Gaĝanov, ul. Petar Janev 21, BG-4600 Velingrad. tel.: +359-35954204, poŝtel. +359898676270,gadzanov_b@abv.bg
**6 - 9. junio** - 103-a Skota Kongreso de Esperanto en norda Skotlando. Inf. David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH. Tel. +44(0)1863766061, rete: David Hannah
**7. junio** - Esperanto-renkontiĝo de natur- kaj danc-amantoj en Česká Třebová, Ĉehio. Inf.: zn.esperanto@seznam.cz
**10 - 18. junio** - 30a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, 12 km de Koszalin. Jubilea ĈEP kun riĉa kaj varia E-programo. (PL). Inf. Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, poŝtkesto 30, PL-75-016 Koszalin-1, Pollando. ĈEP-organizanto: Czesław Baranowski Telefono: +48(0)503-417-825
**26. junio - 2. julio - FREŜO - Frusomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Olŝtinanojn**; en Olŝtino (Olsztyn), Pollando; Reveno al fama antaŭ kelkaj jaroj renkontiĝo kun kvizoj kun valoraj monpremioj; Inf: Marian ZDANKOWSKI, PL-10-343 Olsztyn, Limanowskiego 36/3, Pollando; avolamer@ols.vectranet.pl; Skype: marianzdankowski
**1 - 10. julio** - IET-1, Internaciaj Esperanto-tagoj - ĉemara feria kaj studa aranĝo, kunorganizata de rusiaj kaj ukrainiaj e-istoj. Inf: Zajdman Jefim Semjonoviĉ, tel: +380-964388585, Kontaktaj retadresoj: Jefim Zajdman "jefim_z @ mail.ru" kaj A. Grigorjevskij "andreo @ reu.ru"
**1 - 6. julio - 67-a Hispana Kongreso de Esperanto en la bela kaj historia urbo Cuenca, Hispanio.** Inf: alejandro.pareja@gmail.com
**5 - 12. julio - BET-44, 44-a Baltiaj Esperanto-Tagoj en Ventspils, Latvio. Inf.: Latvia Esperanto-Asocio,** p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio. Rete: margarita.zelve@gmail.com, telefone: +371-26407174 (Margarita Zelve), +371-67383461, +371-28486628 (Biruta Rozenfelde)
**11 - 19. julio** - Kulturturisma semajno UK-antaŭkongreso DE-37412 Herzberg Harz, Grubenhagenstr.6. Tel: +49/(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de
**12 - 18. julio** - Internacia Esperanto-Konferenco 2008. La temo: Fernando de Diego - la vivo kaj verkoj. Elekto de OSIEK-premio okazos en Nova Gorica, Slovenio. Inf.: rete: eric@laubacher.fr aŭ ed.borsboom@versatel.nl
**12 - 19. julio** - KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) okazos en la ĉarmega urbo de kastelo Hamlet Helsingør. Inf.: David-Emil Wickström, kef9@tejo.org
**19 - 26. julio** - 93-a Universala Kongreso de Esperanto, UK-2008, en Rotterdam, Nederlando. Inf: UEA, Nieuwe Binnenweg 193, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel: +31-10-4361044, rete: info@uea.org
**26. julio - 2. aŭgusto** - IJK, Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Szombathely, Hungario. Inf: LKK de IJK 2008, HU-1675 Budapest, Pf. 87
**20 - 24. aŭgusto** - 100-jara Jubileo de Esperanto-Movado en Lodzo kaj 31-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en urbo Łodz.
**26. oktobro - 2. novembro** - 3-a Kijiva Esperanto-Semajno. Inf: p/k 35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio; tel.h. +38044-2851701, tel.p.+3-80974403172; V.Hordijenko
**6 - 8. decembro** - 34-a Kataluna Kongreso de Esperanto en la urbo Sabadell (apud Barcelono), ligita al la omaĝ-jaro al Jaume Viladoms, Katalunio, Hispanio
**12 - 14. decembro** - IXaj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, Pollando. Inf.: Bjalistoka E-Societo, tel. post la 20.00 h. +48.85.7 44 22 13, skribe PL -15-282 Bialystok, Piekna 3, p.k.67, rete esperanto.bialystok@interia.pl
**25. julio - 1. aŭg. 2009** - 94-A Universala Kongreso Bjalistoko, Polujo info@uea.org

*(aktualigita 25-04-2008 : http://www.eventoj.hu)*